



EKO 2015-18 sendita el Budapeŝto la 12an de majo.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, la E-gazetaro kaj radiostacioj, listoj kaj unuopuloj (petu senpagan ricevon!).

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo.

## AMA-deko – AMAD-eko

Deko da seminarioj pri Aktivula Maturigo (AMO) jam okazis en la unua plena jaro de AMO, inter marto 2014 kaj marto 2015. La intereso pri AMO evidentas. AMO jam adoleskiĝas – preter dek kaj pluen. Post du tagoj estos okazanta AMO 11 en la historia sveda urbo Uppsala. Ni ĝojas anonci du pliajn seminariojn, okazantaj ĝis la UK.

**AMO 12** okazos en Raleigh, Norda Karolino, Usono, kadre de la Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK). La AMO-seminario okazos paralele kun la Kino-Teatro-Festivalo (KTF) inter la 30a de junio kaj la 5a de julio. Inter la prezentantoj estos Paul Gubbins, Christopher Mihm, Jennifer Bondelid, Gary Grady, Chuck Mays kaj Derek Roff, kun temo: ‘Kapabligo en diversaj aspektoj de kino-arto’. Tio inkluzivos la uzon de filmoj en la informado. Ĉu por reklami, informi, eduki aŭ distri, sukcesa filmo devas enplekti diversajn kapablojn, metiojn kaj lertojn, pri kiuj malmultaj ricevis instruon. KTF/AMO donos enkondukon al diversaj aspektoj de sukcesa preparado kaj realigo de filmo. Pri filmado oni laboros pri la funkciado de la fotilo/kamerao, por sukcese kapti la momentojn, registri bonajn bildojn, kaj montri la emocie gravajn elementojn de la rakonto. Pri redaktado, oni devas lerni kiel kunmeti kaj munti la elementojn antaŭe filmitajn, kaj komuniki la rakonton. Unu flanko estas koncepta: malkovri kaj kompreni la rakontajn eblojn, kiuj vere ekzistas en la filmeroj, kaj kiuj ĉiam estas iom malsamaj ol la intenco de la verkisto kaj la komenca plano. Poste, necesas elekti kaj konkretigi unu specifan kaj finan rakonton, kaj kunmeti ĝin el la plej trafaj pecoj, per flankenmeto de ĉio balasta aŭ malhelpa.

Partoprenantoj kreos kompletan filmeton dum la seminario, inkluzive de verkado de scenaro, reĝisorado, lumigo, sonregistrado kaj redaktado. Plie oni spektos mallongajn filmojn kaj analizos kaj kritikos ilin. Pri la organiza teamo: <http://kotofesto.org/teamo-2015-test/> kaj plio ĉe:

<http://esperantic.org/eo/komunikado/novajxoj?n=146>

**AMO 13** okazos en Kinŝaso, DR Kongo, inter la 4a kaj 11a de julio kun temo: ‘Lingvo kaj kulturo de Paco’. Tio okazos kunlabore inter la Landa Asocio de UEA (DKEA,





prez. Lungikisa Sumbu), kaj la Nacia Komisiono por Unesko (Liema Ibongo Botie). Gvidantoj estos NLANDU LUYALU (Ĝenerale pri lingvo lernado), Arlain KIZEYIDIOKO (Espranto-didaktiko), MAFUILA MAVOMO (Instrumentoj kaj Historio de la Esperanto-movado en Afriko), BATANGU MPESA (Kiel lerni Esperanton en la loka lingvo Kikongo), OMBA Alexandrine (Planado de instruista laboro kaj organizado de kursoj), MAZANGU DIUMBEKI (Konsiloj pri lingvo-instruado kaj konversaciaj rondoj). En la PDF-versio, vidu foton pri la lastatempa agado en DR Kongo.

**AMO ĝenerale:** La iama ideo pri AMO en SES (Somera Esperanto-Studado) forfalas, favore al pli interesa slovaka propono en januaro 2016. La sekva ĉi-jara eblo estas AMO en IJK. Tuj kiam sciante, sekvos informoj pri tio kaj la AMO-programo tra la dua jaruono.

## Se vi estas komunikema...

Gazetaraj komunikoj delonge disiras el la Centra Oficejo al movadaj agemuloj: revuoj, landaj kaj fakaj asocioj kaj multaj aliaj. Ĝi sendis preskaŭ 600 komunikojn. Ni memorigas al vi, ke unuopulo aŭ klubo rajtas peti la senpagan ricevadon de tiuj komunikoj (averaĝe trideko jare) –sendu al CO retadreson kune kun peto aŭ uzu la abonilon (sur verda fono) ĉe [www.uea.org/aktuale/komunikoj](http://www.uea.org/aktuale/komunikoj). Ekde 2013 la estraro sendas informojn pri agado, kun la nomo EKO – Estrara Komunikio. Tiuj disiras al similaj grupoj, kun pli ol 800 ricevantoj. **Nova servo:** vi kiel unuopulo aŭ klubo rajtas peti ricevadon de tiuj komunikoj, kiuj plej kutime havas nepezan ilustritan PDF-version. En 2014 disiris 53 tiaj komunikoj. Por aldonigi vin al la sendolisto, sufiĉas komuniki retadreson kun peto al la pretiganto: [stefan.macgill@gmail.com](mailto:stefan.macgill@gmail.com) Ambaŭkaze, ĉesigopeto estos atentata. Ambaŭkaze, bv. doni vian plenan nomon kaj loĝlandon, se tiuj ne videblas ene de la retadreso.

Evidente, la supra mesaĝo ne celas vin, kiu jam ricevas (iel, ial) la komunikon. Bv. helpi al ni diskonigi la informojn al tiuj, kiuj ne estas inter la nunaj ricevantoj! Dankon!

## Landaj kaj Fakaj Asocioj respondadis

Jen kompletigo al la informoj en EKO 15. Landoj aŭ fakoj dike prezentitaj aldoniĝis al la kolekto. La landoj, venis el VE – Venezuelo, BG – Bulgario, TJ – Taĝikio, AL – Albanio, NL – Nederlando, CA – Kanado, CH – Svislando, GB – Britio, IT – Italio, SE – Svedio, DK – Danlando, PL – Pollando, JP – Japanio, BR – Brazilo, SI – Slovenio, LU – Luksemburgo, FR – Francio, VN – Vjetnamio, NC – Nikaragvo, ES – Hispanio kaj nun HR **Kroatio**, TW – **Tajvano**, AT **Aŭstrio**, kun skriba raporto el **Nepalo**, do 24 landoj kaj landpartoj.

Fakaj Asocioj respondis (alfabete): **ateistoj**, bahaiistoj, ekologoj, etnismo, eŭropismo (EDE), juristoj, kolektantoj, kvakeroj, medicinistoj, sana vivo (Bruno Gröning), skoltoj, spiritistoj (Lorenz), unu mondo,

komercio kaj ŭonbulismo (*nomo korektita: SMG*). ILEI (instruistoj) ja sendis ampleksan raporton. Do, 16 respondoj el sendolisto de 55.. Rimarkeblas, ke la religiecaj grupoj eksterproporcie reagis.

Se via FA aŭ LA ja respondis, kaj ne aperas en la listo, protestegu! Gratulon kaj dankon al ĉiu respondinto!

## Bondeziroj al la Tria Tutmonda Kolokvo pri la Instruado de Esperanto

Dum okazos en Svedio AMO 11, samtempe en Svislando en la urboj Neuchâtel kaj La Chaux-de-Fonds okazos grava evento en la vivo de nia faka asocio pri instruado: ILEI. Vidu pli da informoj en EKO 2015/4. Tiu kolokvo arigis respektindan kolekton da prelegontoj kaj referantoj kaj postulis multan preparan laboron, inkluzive de la aperigo de novspeca kvar-lingva bulteno *Svisa Espero*, kiu raportas detale pri la baldaŭa aranĝo. La reprezentanto de UEA dum la aranĝo estos Duncan Charters. Ni deziras al la aranĝo plenan sukceson!

## UEA vidigas sin en Monda Eduka Forumo

Tio okazos ekde la 18a de majo en la korea ĉefurbo, kun longe preparata aktiva partopreno de UEA kaj la Korea Esperanto-Asocio. Alveninta en la lastaj 30 minutoj – bildo de unu flanko de la trilingva informilo pri la eduka valoro de Esperanto uzota en la E-budo. La PDF-versio de la nuna komunikilo montras la prospekton. Vidu revuon *Esperanto* de majo 2014 pri la diskutpunktoj por tiu grava forumo.

